★

# Invitilo al komuna programo

# de Esperantista klubo Brno

# kaj Esperantista klubo en Glivice

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al komuna programo de du esperantistaj kluboj el du landoj – ĉeĥa klubo en Brno kaj pola klubo en Glivice.

Temo

## Venenaj plantoj

Inter plantoj estas tiuj, kies metabolismoj kreas substancojn, kiuj por aliaj organismoj estas venenaj. Eĉ unuĉelaj plantoj - bakterioj kaj cianobakterioj - produktas venenojn, kiuj kapablas mortigi homojn kaj bestojn. Al efikaj plantaj substancoj apartenas alkaloidoj, glikozidoj, esencoj, rezinoj, tanantoj kaj amaraĵoj. Ofte unu planto enhavas ne nur unu, sed kelkajn venenajn substancojn. Venenaj plantoj senvalorigas paŝtejojn kaj fojnon, kelkaj plantaj venenojn venenigas lakton. Ekde pratempo homoj volas scii efikojn de diversaj plantoj. Venenaj plantoj povas esti utilaj, ĉar iu veneno en taŭga dozo povas esti kuracilo, aŭ eĉ antidoto. Ni uzas ŝelon, lignon, rezinojn, esencojn, teksaĵojn kaj nevenenajn aŭ taŭge preparitajn (sekigitajn, kuiritajn, bakitajn) partojn de venenaj plantoj. Abeloj kolektas polenon kaj nektaron de multaj venenaj plantoj; nur kelkaj venenaj plantoj donas venenan nektaron, kiu venenigas mielon. Bedaŭrinde homoj venenajn plantojn ankaŭ misuzas en formoj de venenoj kaj drogoj. Multe da venenaj plantoj kreskas en ĝardenoj, parkoj, tombejoj kaj sovaĝe. Oni plantas venenajn plantojn ankaŭ en loĝejoj. Precipe scipovaj infanoj povas veneniĝi ekzemple per belaj fruktoj de venenaj plantoj, kiuj iam havas eĉ bonan guston. Scio de venenaj plantoj estas necesa por pli bona ekkompreno al naturo.

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 14-an de junio 2023 je 18.00 (UTC+2).

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Zoom**

Jen la ligilo: https://polsl-pl.zoom.us/j/93116604802?pwd=MGJzQ0pmeklOMCtYamJUMlA0all2Zz09

Enirkodo: 931 1660 4802

Pasvorto: 235959.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

La renkontiĝo estos registrata.

★

# Ni rekomendas

- La 18-an de junio la Esperantistan renkontiĝon sur la montopinto Ĉantorio ĉe landlimo en Beskid-montaro
- la 23an – 25an de junio **Tutslovakia Esperanto-Kongreso**, Nová Dubnica, Slovakio
- 29 de julio — 5 de aŭgusto 2023 **Universala kongreso**, Torino, Italio
- 5 – 12 aŭgusto 2023 **Kongreso KELI**, Bjalistoko, Pollando
- **Instruista trejnado, Poznano**. Pli de informojn vi povas legi en artikolo verkita de Ilona Koutny kaj Katalin Kováts ĉe http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/instruista-trejnado.html.
- Dujara ĉeesta magistra studado Linguistics and Information Management en Universitato de Adam Mickiewitz en Poznano. Pli da informoj vi trovos ĉe https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/.

★

# Cetera programo en junio

La 21-an **Kradrostado en parko Luĵanki,** Brno ekde 16-a horo
La 28-an **Antonie Janalíková** – Miroslav Malovec, rete per Skajpo

Al la kradrostado estas invitataj ankaŭ nebrnanoj, se vi povas alveni en Brno. Bonvolu skribi al mi, se vi volas partopreni.
Dum ferioj niaj renkontiĝoj ne okazos. Mi rekomendas al vi partopreni en iu internacia somera aranĝo. La unua postferia renkontiĝo okazos rete la 6-an de septembro kaj la unua en la klubejo estos la 13-an de septembro en klubejo (denove Občanský klub, Hybešova 65a, Brno). Mi jam petas vin, ke vi pripensu programon por aŭtuno.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://brno.esperanto.events)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu).

Milan Kolka
prezidanto